

BELGA ESPERANTISTO

46a Jaro — N-ro 10a — Decembro 1954a

Fondita
en 1908a



Redaktejo-Administrejo :
ĉe la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,
aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

Festa Semajno-Fino por 200 Frankoj!

En nia antaŭa numero, ni anoncis ke starigis en Antverpeno Festkomitato, kiu organizos la festojn okaze de la ORA JUBILEO de nia Ligo, kiuj okazos en nia granda Havenurbo sabaton, la 12an, kaj dimanĉon, la 13an de februaro 1955a.

Ni aldonis ke oni povas fidi tiun Komitaton, kiu certe organizos la tutan aferon plej bone.

Grava fakto estas, ke tiu festa Semajnfino ne kostu tro multe al niaj membroj kaj precipe ne al tiuj, kiuj venos el aliaj urboj, kelkfoje malproksimaj kaj kiuj devos tranokti.

Tiun gravan demandon la Komitato jam solvis, tre certe je ĉies kontentigo kaj, ni povas eĉ aldoni: je ĉies miro!

Por DUCENT FRANKOJ, ĉiuj povos pasigi la semajnfinojn en Antverpeno. Kaj tiu ĉi sumo enhavas ne nur la KOTIZON por partopreni al la diversaj aranĝoj, sed ankaŭ la dimanĉan FESTENON, kun la trinkmono; kaj same la TRANOKTON, en plej komfortaj cirkonstancoj kun la MATENMANGO de la dimanĉmateno, ne laŭ belga aŭ franca modo... sed, ni diru, laŭ esperanta maniero, t.e. pli ol sufiĉa!

Restos do, por la vizitantoj, nur la vespermango de la sabato, kiu neniam estas antaŭaranga; por kiu ĉiu povas alporti kelkajn bulkojn, se li ne deziras ilin mendi en Antverpeno, kie cetere ni povas garantii tre decan vespermangon, en komforta restoracio, je Fr. 25.

Ni kredas ke, je tiaj kondiĉoj, la partopreno al niaj jubileaj festoj estas ebligata al ĉiuj, kiuj vere interesiĝas pri ili!

En momento, kiam societoj ĉiuspecaj organizas regule unutagajn aŭtoĉar-ekskursojn, kiuj kostas almenaŭ la saman prezon, oni povas diri ke la antverpena organiza komitato trovis nees-pereblan solvon al tiu ĉi delikata problemo.

Restas do al la prezidantoj kaj estraroj de Grupoj la zorgo nun tuj kon-

vinki siajn gemembrojn, ke ne nur de-cas, sed ke estas devo por ĉiu Grupo, ke ĝi estu multnombre reprezentata dum tiuj ĉi esceptaj festoj, pli gravaj eĉ ol ordinara kongreso ĉiujara.

Estas unika okazo por revidi ĉiujn malnovajn konatojn, kiuj tre certe ĉiuj intencas ĉeesti tiujn ĉi festojn, dum kiuj ili estos specialmaniere honorigataj... Kaj ankaŭ unika okazo por la pli junaj kaj novaj, por ĉeesti gravan okazantaĵon en nia nacia movado.

La programon de tiu FINSEMAJNA FESTADO oni trovos sur alia paĝo de tiu ĉi revuo. Ankaŭ ĝi estas sufiĉe al-goa por altiri ĉiujn.

La propagando por la venigo de kiel eble plej multaj geamikoj devas komenciĝi tuj, tiel ke la organiza Komitato povu esti informata ĝustatempe de la proksimuma nombro de la parto-prenantoj.

Oni do ne atendu kaj ne perdu tempon!

Maur. Jaumotte.

LA MAJSTRO

Mi pensas pri Bialystok, antaŭ preskaŭ cent jaroj, pri alia naskiĝo en 1887...

Kaj pri la modesta, stature malgranda sed spirite giganta okulisto, kiu revis pri interkompreno de ĉiuj homoj kaj realigis konkordon, nu: inter la Esperantistoj... Ĉiam li oferis ĉion for, neis sin mem por la Ideo, por la evidenta solvo, por la Lingvo kaj la Idealo: Esperanto.

Jen mi ekspensas ankaŭ pri ni, la indaj idoj de tiu poletto, pri la Esperantistoj.

Nu, ĉu io ŝanĝiĝis? Vere ne, nenio! Ĉu ni do estas malmodestaj, parolas aŭ skribas pri ni mem, kredas ke ekster nia persono ne eblas progreso por Esperanto? Kompreneble ne!

Ĉu ni do ne same oferas for nian tempon, niajn ambiciojn, eĉ nian monon kaj neas nian personon, forgesan-

Esperanto antaŭ UNESKO

Nunmomente kunsidas en Montevideo la delegacioj de la diversaj landoj, kiuj estas reprezentataj en UNESKO, kaj estas dum tiu ĉi asambleo sesio, ke estos antaŭmetata al ili la demando pri ESPERANTO.

Ĉiuj registaroj jam antaŭe informis la estraron pri sia ĝenerala vidmaniero pri la problemoj kaj, se ni povas ĝojigi pro kelkaj tre simpatiaj apogpromesoj de malgrandaj landoj, la informoj ĝis nun ricevitaj de la grandaj racioj estas malpli kuraĝigaj.

Tial ni volas speciale atentigi, ke ni ĵus legis en la numero „novembro-decembro“ de „Franca Esperantisto“ ke „en ĵusricevita letero de la Franca Ministro pri Nacia Edukado, estas menciite, ke la Ministro mem ordonis al la franca delegacio en Montevideo, montriĝi „konsentema“ pri la proponoj prezentotaj de U.E.A., fare de Prof. Lapenna.“

Esperu ni, ke ankaŭ kelkaj pliaj gravaj landoj estos dorintaj al sia delegacio same komprenemajn instrukciojn!

(Legu lastajn depeŝojn p. 74 kol. 2)

te eĉ la propran nomon? Kompreneble jes!

Ĉu ni do ne same aspiras al interkompreno inter ĉiuj homoj, ignorante la rasojn, la lingvojn, la politikajn kaj filozofiajn diferencojn aŭ nuancojn, kvazaŭ ni sentus strebadojn al io alia ol la venko de Esperanto? Kompreneble jes!

Ĉu eblas aldoni ion pri la konkordo inter samideanoj? Ne, ĉiel ne: la poletto ne komprenus la demandon! Cetere, nun ne ekzistas io tia: eĉ ne la neakceptita statut-projekto, ĉar demokrataj reguloj diktas la solvon!

Do, nenio ŝanĝiĝis, nenio. Kiel feliĉaj ni estas, tial!

Kaj mi ree pensas pri la Majstro, kiu estas nepre kontenta kaj kiu flustras: nu, ne hipokrite nomu min la Majstro, diru eĉ Luĉjo aŭ Zaĉjo sed agu kiel mi provis mem por nia sama celo, nia nedireble nobla celo!

15.XII.54.

d-ro T. Ken.

La 3-a Beneluxa Esperanto-Kongreso

Dum pentekosto 1955a okazos nia kongreso en Utrecht. En oktobro vi jam povis legi ke la L.K.K. komencis la laboron. Sed vi ne trovis la nomojn de la L.K.K.-anoj. Nu, jen ili estas:

G. H. Koudijs, prezidanto.

H. J. Blokker, vic-prezidanto por L.E.E.N.

D-ro Th. v. Gindertaelen, vic-prezidanto por F.I.L.E.

H. Sielens, vic-prezidanto por R.B.L.E.

F-ino A. J. M. Perk, sekretariino, Paulus Potterstraat 18, Utrecht.

F-ino C. Brouwer, Kasistino, poŝtgironto 6403.23 je la nomo de Penningmeester-esse Tria Beneluxa Esperanto-Kongreso.

W. R. Koopmans, S-ino J. Keur-Meenhorst kaj J. Vanecek, anoj.

La membroj de F.I.L.E. kaj de R.B.L.E. mendu kaj pagu al siaj respektivaj kasistoj, kiuj estas: F-ino J. Terriijn, Raapstr 74, Gent (p.ĉ.k. VEB, Raapstr. 74, Gent, nro 232150); S-ino J. Plyson, rue Jourdan 185, Bruselo. p.ĉ.k. nro 37.66.98 de „Belga Kongreso de Esperanto”, Bruselo.

La kongresejo estos la hotelo Smits, Vredenburg 14. La 28-an de majo je tagmezo oni povos tie jam ricevi siajn dokumentojn. Posttagmeze la ĉefestraro de L.E.E.N. akceptos en la kongresejo pro la jubileo.

La oficiala malfermo, la vespera festo kaj la balo okazos en la „Gebouw voor Kunsten en Wetenschappen”, Mariaplaats 27. Pri la festo ni poste informos vin. Estas certe, ke ni aŭdos la kantatona de Frieso Molenaar, kaj Sinjorino Koopmans-Schotanus promesis kunlabori.

Kompreneble oni ankaŭ planas promenojn tra la urbo, vizitojn de muzeoj k.t.p. Iom pri la ekskurso.

Je la naŭa ni forveturos al la nacia parko „Hoge Veluwe”. Tie ni povos trinki kafon kaj mangi bakajojn. Poste ni povos promeni, La plej longa promeno, kiun ni intencas fari, daŭros unu kaj duonan horojn. Kiu ne ŝatas promeni ne bezonos cerbumi, ĉar la promenantoj revenos al la forir-loko! Tiam ni lunĉos kaj post tio ni reiros aŭtobuse al Utrecht. Je la kvara ni denove estos en la kongresejo por la ferma kunsido.

El la pasinta mondlingva movado

La nuntempa samideanaro eble ne scias, aŭ ne plu memoras, ke iam ekzistis privataj klopodoj, pliigi la jam estantan vicon da Internaciaj Oficejoj per t.n. *Mondlingvo-Oficejo*. Ĉefinicianto estis la konata Prof. Wilhelm Ostwald el Leipzig, kiu en septembro 1910 per preleĝoj sugestis la fondon de tia oficejo kun la taskaro klare fiksi la evolufazojn kaj la tiaman staton de la mondlingva movado kaj garanti al tiu ideo konstantan akcelon. Prof. Ostwald kun kelkaj helpantoj sukcesis anigi al sia plano aron da privatuloj kaj societoj. La 27an de februaro 1911 estis fondata en la svisa ĉefurbo Bern la „Unuiĝo por kreonta Mondlingvo-Oficejo”. La fondintoj elektis Kolonelon Emil Frey, la eks-prezidanton de la Federacia Konsilistaro kiel honoran prezidanton, Dron Albert Gobat, la Nacian Konsilanton kaj Registran Konsiliston de la kanton Bern kaj pliajn 25 membrojn por la estraro. La laŭstatuta celo de la Unuiĝo estis preparadi kaj instigadi diplomatan agon koncerne la fondon unue de Internacia Mondlingva Societo kaj finfine de la Mondlingvo-Oficejo. Ĉi-lasto estus zorganta laŭ „strikte neŭtrala maniero” pri la enkonduko de oficiale rekonota mondlingvo. En la unua, presita jarraporto 1911 (supoze ne sekvis pliajn) la Unuiĝo nombbris 104 membrojn el 11 diversaj ŝtatoj. Oni intencis fervore propagandi internacie kaj esperis, helpe de la Svisa Federacia Konsilistaro, antaŭenigi la afe-

ron. Koninte la agantojn, la esperantistaro dekomence detenis sin de tiu de Idistoj provita, tendence vualita entrepreno. La ne-neŭtralaj gvidantoj sin mem manovris en dilemon kaj tre baldaŭ la kreaĵo fiaskis kaj plene disfalis. Ĝia vera karaktero plej draste estas pruvita pro la fakto, ke la iniciantoj de la menciita Unuiĝo en la jaro 1913 perletere proponis al la Svisa Federacia Konsilistaro, al la Registaro de la kanton de Bern kaj al la Konsilistaro de la urbo Bern neniel subvencii la Naŭan Universalian Kongreson de Esperanto en Bern.

D-ro A.B.-n/FST

Lastmomentaj depeŝoj!

El Montevideo oni ĵus eksciis ke la Plenumkomitato de UNESKO decidis, per ĉiuj voĉoj kontraŭ du, rekomendi al la Ĝenerala Konferenco la akcepton de UEA kun konsultita pozicio. (Laŭ ĵus ricevita informo de d-ro Lapenna, nia Observanto ĉe la Konferenco).

**

El Londono ni ricevis la konfirmitan novajon ke la projekto de nova UEA-statuto ne estas akceptita, ĉar la por-voĉoj ne atingis la 3/4 de la esprimitaj voĉoj. Ni ankaŭ povas anonci ke la voĉdonis „por” la nederlanda asocio LEEN kaj „kontraŭ” la belga, flandra kaj svisa asocioj.

Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj
Belga Esperantisto

deziras al vi

feliĉajn festojn

je KRISTNASKO kaj NOVJARO

Al la 15a de decembro

Naskiĝtago de Zamenhof

Denove rememoras ni la tagon, kiu lumon al ni naskis fendante hele la ĝangal-krepuskon. El eta pola urbo ĉi radi' mision gloran al ni ĉiuj taskis: plue transplanti ĝin en ĉies bruston.

Simpla, modesta homa fil' kaj diligenta paca batalinto, hodiaŭ via nobla verko kaj strebado' por multaj jam fariĝis kara, sankta il' en la babela monda labirinto, sorĉ' kiu homon igas homa frat'.

Scias ni, ke ĝi estas sorĉ', kvankam ĝi ŝajnas nun Kolumba ovo! Vi, Majstro, ĉi miraklon al ni donis. Ne gravas, ke ankoraŭ tiu torĉ' videblas ne por ĉies vidopovo, ke iuj ĉe ne vidi ĝin ordonis.

Konscias longe ĉia jam, ke sole lingva diversec' ne baras homaron sur la voĵ' al paco kaj feliĉ', ke la kondiĉ' de harmonio estas am', ĉe kies flankoj just' kaj klero staras, ke knuton anstataŭu honestiĝ'.

Vi, kara Majstro, sciis ĝin, kvankam en temp' alia, vi tre klare fidon al venko de prudent' esprimas. Denove ŝtormas. Sed ni sekvas vin kaj meti niajn korojn malavare sur la altaron vian ni ne timas.

Jiri Korinek

DORMANTAJ MEMORAĴOJ

Kiel en konkoj la perlajoj
Sur la inerta mara fundo,
En monotona korprofundo
Ripozas karaj memoraĵoj.

Se kaptdeziro lerte glitos,
Perlaron ĉerpu el trunkvilo,
Sed lasu ĝin en ĉi azilo
Se ploros vi kaj tro meditos.

Tra disreviĝoj ĉiuj havas
Feliĉajn tagojn malpli nombrajn.
Forgesu ja la horojn sombrajn,
Admiru tiajn kiaj ravas.

Ornamoj estis de la vivo
Ĉi tiuj enkaŝitaj gemoj.
Do ridu! Vivu plu sen ĝemoj:
Vi eble estas ĉe la vivdeklivo...

Anna Meurrens

LA GIMNAZIO

de: Salom Aleĵnem

el la hebrea: d-ro L. L. Zamenhof

(Fino)

„Nu”, mi diras al mi, „tio estas ja fine la ĝusta afero!” kaj mi klarigas al li, ke mia nomo estas Katz Arono katz, kaj mia filo estas nomata Moseo t. e. Mosko, kaj mi volas, ke li eniru en la trian klason. Tiam li diras al mi, ke se mi estas nomata Katz kaj mia filo estas nomata Moseo, t. e. Moŝko, kaj li volas eniri en la trian klason, mi alkonduku lin, li diras, en Januaro, kaj li tiam certe estos akceptita. Vi komprenas? jam tute aliaj paroloj! Videble, se oni ŝmiras, oni veturas... Estas nur bedaŭrinde, ke ne tuj; sed kion fari? se oni ordonas atendi, oni devas atendi, hebrea ja al kutimiĝis...

Venis Januaro, denove tumulto, kurado tien kaj reen: hodiaŭ, morgaŭ devas esti kunsido, ili ĝin nomas „sovjet”; kunvenos la direktoro kun ĉiuj instruistoj de la gimnazio, kaj nur post la kunsido, t. e. post la „sovjet”, kiel ili ĝin nomas, oni scios, ĉu la knabo estas akceptita aŭ ne. Venis la ĝusta laboro; mia kunulino ne estas plu hejme; ne ekzistas tagmango, ne ekzistas samovaro, nenio ekzistas: ŝi estas en la gimnazio; aŭ pli vere, ne en la gimnazio, sed apud la gimnazio; ŝi vagadas ekstere en la frosto de la plej frua mateno, kaj ŝi atendas, ĝis oni diros de la kunsido, t. e. de la „sovjet”, kiel ili diras... La frosto trancas, neĝvento blovas, malbonega vetero, kaj ŝi vagadas ekstere apud la gimnazio kaj atendas; virino ĉiam restas virino! Ŝi scias je tre bone, ke se oni promesas, oni sankte plenumas, tiom pli ke... vi komprenas? sed iru, parolu kun virino! Unuvorte, ŝi atendas unu horon, ŝi atendas du horojn, ŝi atendas tri horojn; ŝi atendas kvar horojn; ĉiuj infanoj jam delonge disiris el la gimnazio hejmen, kaj ŝi ĉiam ankoraŭ atendas. Tamen kion ŝi volas? ŝi atendis tiel longe, ĝis ŝi fine atend-atingis sian celon: la pordo malfermiĝas, kaj el tie eliras unu el la instruistoj; ŝi tuj alsaltas al la instruisto kaj kaptas lin kaj demandas, ĉu li ne scias, per kiaj decidoj finiĝis la kunsido, t. e. la „sovjet”, kiel ili diras. Kaj li respondas: „kial do mi ne scias? oni akceptis”, li diras, „entute dudek kvin infanojn, dudek tri kristanajn kaj du hebreajn”. „Kiun?” ŝi demandas. — „Unu nomatan Ŝapselson kaj unu nomatan Katz”. Apenaŭ ŝi aŭdis la nomon Katz, mia virino simile al sago el pafarko flugas hejmen kaj enkuras en la domon kun ĝojego: „Mi gratulas! Mi dankas vin, ho, granda Dio, mi dankas! Akceptita! akceptita! Kaj dume ŝiaj okuloj estas plenaj de larmoj... Al mi, kompreneble, la afero ankaŭ certe estas agrabla, sed danci pro tio mi ne havas ja la devon,

mi estas ja viro, ne virino... „Mi vidas”, ŝi diras al mi, „ke por vi tio ne havas tre grandan valoron?” — „Kia kaŭzo”, mi diras, „vi faras al vi tian komenton?” — „Tiakaŭze, ke vi estas malvarma peco da viando; se vi scius”, ŝi diras, „kiel la kompatinda infano tremas de emocio, vi ne sidus tiamaniere, vi jam de longe kurus mendi por li uniformeton kaj ĉapeton kaj v. rapidus”, ŝi diras, „fari festenon por la amikoj.” — „Kial subite fari festenon?” mi diras; „ĉu ĝi estas bar-micvo 14) aŭ fianĉigo?” Tiele mi diras al ŝi tute trankvile, ĉar mi estas ja viro... Tiam ŝi ofendiĝas kaj tute ĉesas paroli kun mi; kaj se edzino ĉesas paroli, tio estas ja miloble pli malbona ol insultado, ĉar, se ŝi insultas, oni almenaŭ aŭdas homan voĉon, kaj nun... parolu al la muro!... Unuvorte, por kio mi devas multe paroli? venkis kompreneble ŝi, ne mi; ĉar se „ŝi” ion volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, oni faris festenon. Oni kunvokis parencojn kaj amikojn, kaj la knabon oni vestis de la kapo ĝis la piedoj: tre bela uniformo kun blankaj butonoj, ĉapo kun ornamajeto 15) antaŭe, — plena guberniestro! Kion oni agis koncerne lin, tio efektive estis plene meritita, oni enmetis en lin kvaŭzaŭ novan animon, oni simple lin revigigis; li brilis, mi diras al vi, kiel la suno en Julio. La gastoj trinkis pro sano, oni gratulis, oni bondeziris: „Li lernu en plena sano, li finu la gimnazon en plena sano, li sane iru el tie ĉiam pluen kaj pluen, en la universitato...” — „He”, mi diras, „tio ĉi tute ne estas tiel necesa; oni povos”, mi diras, „esti kontenta ankaŭ sen tio; li nur finu la ok klasojn de la gimnazio”, mi diras, „tiam mi lin edzigos kun helpo de Dio...” Tiam mia kunulino diras kun rideto kaj rigardante min per siaj okuloj: „Diru al li, sinjoroj, ke li — mi petas lian pardonon — forte eraras; li vivas ankoraŭ laŭ la malnovaj manieroj.” — „Diru al ŝi, sinjoroj, ke mi dezirus havi tiom da benoj, kiom la malnovaj manieroj estas pli bonaj ol la novaj.” — „Diru al li, sinjoroj”, ŝi respondas, „ke li estas, li min pardonu...” Tiam la gastoj laŭte ekridis: „Aj, sinjoro Arono”, ili diras, „vi havas edzinon — bravulinon, Dio ŝin konservu; kozako, ne edzino!” Dume la gastoj trinkis po glaseto da vino, oni bone glutis, oni fariĝis viglaj; kaj oni kaptis nin ambaŭ en la rondon kaj la knabon ankaŭ en la mezon, kaj oni saltis, tute gaje, ĝis plena tagiĝo. Matene ni foriris kun li „tien”. Kiam ni venis tien, estis ankoraŭ tre frue, pordoj kaj pordegoj estis ankoraŭ ŝlositaj, ne troviĝis an-

koraŭ, kiel oni diras, eĉ freneza hundeto sur la strato. Longe ni staris ekstere kaj sufiĉe nin turmentis la frosto, tial ni ekĝuis grandan plezuron, kiam oni malfermis al ni la pordon kaj, dank' al Dio, enlasis nin internen. Baldaŭ komencis kolektiĝi la anaro de la malgranduloj, kun la tornistretoj sur la dorsoj; fariĝis bruo, tumulto, babilado, ridado, kurado, hu, ha, tuta foiro! la blankbutonaj buboj saltadis, regaladis sin reciproke per frapoj, puŝoj, pinĉoj... Rigardante tiujn bubetojn kun la ruĝaj vangetoj, kun la ĝojaj ridantaj okuletoj, mi rememoris — pardonu la komparon — nian estintan malluman, malvastan, malgajan ĥederon de la pasinta tempo, kaj mi konvinkiĝis, ke efektive „ŝi” estas prava; ŝi estas nur virino, tamen ŝi havas sur si viran kapon!... Kaj dum mi tiamaniere meditas, alvenas al mi iu kun orkoloraj butonoj, videble instruisto, kun folio da papero en la mano, kaj li demandas min, kion mi bezonas. Mi montras al li mian knabon, kaj diras, ke mi alkondukis lin en la ĥederon, t. e. en la gimnazion. Tiam li demandas min: „en la kioman klason?” — „En la trian”, mi diras; „li ĵus estas akceptita.” Li demandas min, kia estas lia nomo. „Katz”, mi diras, „Moseo Katz, t. e. Moŝko Katz”. — „Moŝko Katz?” li diras, — Moŝkon Katz li ne havas en la tria klaso! ekzistas, li diras, en lia listo iu Katz, tamen ne Moŝko, sed Morduh, *Morduh Katz*... „Kia Morduh!” mi diras; „ne Morduh, sed Moŝko!” — „Morduh”, li diras, kaj li alŝovas al mi la paperon rekte al la vizaĝo. Mi ripetis al li „Moŝko”, li ripetis al mi „Morduh!” Unuvorte, Moŝko, Morduh, Morduh. Moŝko, ni tiel longe nin reciproke moŝkadis kaj morduhadis, ĝis ni sciigis tre belan historion: kion oni devis fari al mia knabo, oni faris al tiu! Vi komprenas la aventuron? Oni efektive akceptis unu Katz-on, jes, sed erare oni akceptis alian, ne nian! vi devas scii, ke en nia urbo ekzistas du Katzoj!... Kion vi diros pri tia historio? Mi pretigis la liton, kaj tiu havas la plezuron! Vi devas scii, kiu estas „tiu”, t. e. tiu Katz: senvალა nulo, metiisto, ŝajnas al mi, ke li estas bindisto aŭ io simila; per si mem li eĉ estas tute kvietita hometo, sed kiu lin konas, kiu scias pri li? absoluta senhavulo! Kaj nun lia filo estas akceptita! Ĉu ne povas krevi la galo? Diru vi mem!

Vi devis vidi la korŝirantan vizaĝon de mia knabo, kiam oni ordonis al li, ke li bonvolu depreni la ornamajeton de sia ĉapo! „Vi jam ne estas plu asero!”... Fianĉino dum la edziniĝa ceremonio certe ne devas elverŝi tiom da larmoj, kiom mia knabo elverŝis en tiu tago! Kiom ajn mi petis lin, ne helpis petoj, nek minacoj. „Nu”, mi diras al „ŝi”, „vi vidas, kian amuzon vi aranĝis? Ĉu mi ne diris al vi, ke via gimnazio estos por li buĉejo? Dio helpu”, mi diras, „ke ĝi almenaŭ finiĝu por mi

glate, ke li — Dio gardu — ne mal-saniĝu..." — „Miaj malamikoj", ŝi diras, „malsaniĝu, se ili volas, sed mia infano *nepre* devas eniri en la gimnazio! se li ne eniris *nun*, li eniros, se Dio permesos, *post unu jaro*; se li ne eniris *ĉi tie*, li eniros en *alia* urbo! Eniri li *nepre* devas, esceptinte nur se mi — Dio gardu — fermos miajn okulojn kaj la tero min kovros!" Vi aŭdas la parolojn? Kaj kiel vi pensas, kiu venkis? mi aŭ ŝi? Ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi" volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, por ne paroli tro longe, — multe mi devis klopodi kaj suferi kun li. Mi estis kun li ĉie, kie nur ekzistas urbo, kie nur ekzistas gimnazio, ni estis, ni prezentigis, ekzamenigis, kaj efektive sukcese ekzamenigis, kaj efektive ricevis la plej altajn notojn, kaj tamen efektive ne estis akceptitaj! Kial? ĉiam pro la „procentoj"! Vi povas kredi al mi, mi tiam mem rigardis min kiel frenezulon: „malsaĝulo", mi diradis al mi, „kio? por kio vi kuradas el unu urbo al alia? por kio diablo vi tion bezonas? nu, kaj se li eĉ jam estos akceptita, kio estos tiam?" Ne, diru, kion vi volas, obstineco estas granda afero; ĝi jam ĉe mi mem fariĝis afero de necedema ambicio. Fine Dio min kompatis, kaj mi trovis en Polujo tian specon de gimnazio, „komercan" gimnazon, en kiu apud ĉi kristano oni akceptas unu hebreon, t. e. oni akceptas kvindek procentojn. Sed kio estas la esenco? Ĉiu hebreo, kiu deziras, ke lia infano estu akceptita, devas veni kun sia kristano, kaj se li, t. e. la kristano, sukcese faras la ekzamenon kaj vi enportas por li la lernejan pagon, tiam vi havas iom da espero... Sekve anstataŭ unu ŝarĝo oni tiam havas sur si du ŝarĝojn, vi komprenas? Ne sufiĉas, ke mia cerbo turmentigas pri mia propra infano, ĝi devas turmentigi ankoraŭ pri tiu alia; ĉar se — Dio gardu — Esav 16) ne sukcesas, tiam Jakobo pereas... Nu, mi devas diri al vi, antaŭ ol mi trovis tian kristanon, ian botiston — lia nomo estis Holjava, — mi devis multajn fojojn malbeni mian vivon; fine, kiam venis la ĝusta akto, nu, mia botistido ĉe la ekzameno falis en la teron kiel Korah! 17) Kaj la objekto, en kiu li montris plenan nesciadon, estis ĝuste... la „Religio"! Nu, kion mi rakontu al vi? mia knabo devis mem proprapersono sidigi kun li kaj ripetadi kun li la „Religion"... Vi demandas ja sendube, kiamaniere mia knabo scias la kristanan religion? Tion ne demandu, ĉar li scias ĉion kaj estas kompetenta en ĉio kaj komprenas ĉion; se oni diras al vi, ke li havas bonan kapon, vi nenion devas demandi. Unuvorte, Dio helpis, venis la bona horo, la feliĉa horo, ili ambaŭ estis akceptitaj. Vi pensas, ke jam ĉio estas finita? Kiam venis la tempo enskribi en la librojn kaj preni kvitancon, — mia kristano ne aperis!

Kia estas la kaŭzo? Li ne volas, ke lia filo troviĝu inter tiom multe de hebreoj! Faru kun li, kion vi deziras, — li ne volas! Li diras, ke li tion ne bezonas, ĉar por li, kiel por kristano, ĉiuj pordoj ja sen tio estas malfermitaj kaj li povas eniri, kien li volas! Kaj efektive, ĉu li ne estas prava! „Kion do vi deziras, sinjoro Holjava", mi diras al li. — „Nenion", li respondas. Unuvorte, diskuto post diskuto, helpo de komplezemaj homoj... oni iris kun li en restoracion oni trinkis unu glason, duan, trian... Antaŭ ol mi atingis, ke li fine prenis la gimnazian kvitancon, mi perdis ĉiujn miajn fortojn. Fine, kun helpo de Dio, la celo estis atingita, kaj mi dankis la Plejpotencan, ke Li donis al mi ripozon.

Mi venis hejmen, — nova aventuro! Kio estas denove? Mia kunulino primeditis kaj decidis jenon: „Kiel! ni havas ja nur unu solan filon, unu okulon en la kapo, kaj nun li estos tie kaj ni estos ĉie tie? „Se estos tiele", ŝi diras, „por kio mi bezonas mian tutan vivon?" — „Kion do vi deziras, ekzemple", mi diras. — „Kion mi povas deziri? Vi ne scias, kion mi deziras? Mi deziras", ŝi diras, „esti kune kun li." — „Nu, kaj la domo?" mi diras, „kio estos kun la domo?" — „La domo", ŝi diras, „estos domo"... Nu, kion vi povas diri al ŝi? Por ne rakonti longe, mi simple diros al vi, ke ŝi enkaleŝigis kaj forveturis kun li tien, kaj mi restis tute sola en la tuta domo. Prezentu al vi, kian aspekton la domo ricevis! Al miaj malamikoj mi deziras tian domon. La vivo ĉesis esti vivo, la negoco ĉesis esti negoco, ĉio ruinigis, kaj nia tuta okupiĝo fariĝis skribado de leteroj; mi skribas al ŝi, ŝi reskribas al mi! leteroj tien, leteroj reen: „pacon kaj sanon al mia kara edzino"... „Pro Dio", mi skribas al ŝi, „al kio tio kondukos? oni estas ja nur homo! seĝi mastrino kia povas esti la ordo!..." Unuvorte, ĉio helpis kiel la pasintjara neĝo; venkis, kompreneble ŝi, ne mi: ĉar ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi" ion volas, ĉu tiam oni povas ion kontraŭfari?

Nu, mi finos la rakonton. Mi min rompis, mi min detruis, mi ruinigis mian tutan negocon, disvendis ĉion por plej bagatelaj prezoj, kaj mi transpakis min al ili. Kiam mi venis al ili, mi komencis rigardi ĉirkaŭen, por orientiĝi, mi komencis serĉi kaj flari. Kun granda malfacileco kaj post longaj klopodoj mi sukcesis trovi ian voĵeton, mi faris kompanion kun ia komercisto. Laŭ la aspekto li estis eĉ tute bonorda homo, jes... solida mastro kaj apartenas eĉ al la administrataro de la sinagogo... sed esence li estis ruzulo, trompisto, ŝtelisto, li preskaŭ tute malfeliĉigis min! Vi sekve komprenas, en kia stato tiam estis mia kapo...

Kaj jen unu fojon mi venas hejmen, kaj mi vidas, mia knabo venas al mi

renkonte iel strange, kun ruĝeta vizaĝo kaj en ornamajeto sur la ĉapo 18). „Aŭskultu, Moĉjo", mi diras al li, „kien perdiĝis via ornamajeto?" Kaj li diras: „kia ornamajeto?" Mi diras „la butono". Li diras: „kia butono?" Mi diras: la „butono, kiu estis sur la ĉapo; ankoraŭ antaŭ la festoj mi aĉetis ja al vi novan ĉapon kun nova ornamajeto"... Tiam li ruĝigis ankoraŭ pli kaj diris al mi: „mi deprenis"... Mi diras: „kion signifas, ke vi deprenis?" Li diras: „mi estas libera"... Mi diras: „kion signifas, vi estas libera?" Li diras: „ni ĉiuj estas liberaj"... Mi diras: „kion signifas, vi ĉiuj estas liberaj?" Li diras: „ni ne iras plu en la gimnazon"... Mi diras: „kion signifas, vi ne iras plu en la gimnazon?" Li diras: „ni faris komunan interkonsenton, ke ni plu ne iru"... Mi diras: „kion signifas, vi faris interkonsenton? kiaj faristoj? kiaj interkonsentistoj? Nu, bela ĝojo al mi venis", mi diras; „por tio mi min ruinigis, por tio mi min elmetis al ĉiasecaj suferoj kaj humiligoj, por ke vi poste povu fari komunan interkonsenton? Ho ve, ho ve", mi diras, „al vi, al mi kaj al ni ĉiuj! Dio volu almenaŭ, ke tio ne alportu ian grandan malfeliĉon al la hebrea popolo, ĉar ĉie la hebrea estas ja la propeka kapro!"... Tiel mi parolas al li, kaj mi komencas flamiĝi, moralinstrui, kiel ordinare patro parolas kun infano... Sed mi havas ja edzinon, longe ŝi vivu; ŝi alkuras kaj komencas tamburi per sia lango, ke estas tiel kaj tiel, ke mi jam tute sensukigis, ke mi ne havas eĉ plej malgrandan scion pri tio, kio fariĝas en la mondo, ke nun fariĝis tute alia mondo, saĝa mondo, sincera mondo, libera mondo, mondo, en kiu ĉiuj estas egalaj, en kiu ne ekzistas riĉa kaj malriĉa, ne ekzistas sinjoro kaj sklavo, ne ekzistas ŝafo tondata, ne ekzistas hundo bojanta, ne ekzistas kato gratanta, ne ekzistas muso mordetanta..." — „Ta, ta, ta," mi diras, „kie vi prenis tian strangan lingvon? ĝi estas ja nova lingvo", mi diras, „novaj vortoj; eble estos bone, ke vi samtempe jam ellasu la kokinojn el la kago; iru, kokinoj, fariĝu mastrinoj!... Tiam ŝi ekflamas, kvazaŭ mi elverŝus sur ŝin dek sitelojn da bolanta akvo, kaj komenciĝas tra ra, ra, laŭ „ilia" maniero... Nu, oni devas jam aŭskulti la predikon ĝis la fino, sed la malfeliĉo konsistas en tio, ke tiu prediko ne havas finon. „Nu", mi diras al ŝi, „bone, sed nur faru finon; mi batas al mi la bruston, mi konfesas, ke mi pekis, mi krimis, nur faru finon, nur lasu al mi pacon!" Sed ŝi ne volas aŭdi nek vidi... „Ne", ŝi diras, ŝi volas scii, kial, kaj por kio, kaj kiarajte, kaj precize, kaj kontraŭe, kaj kiel la konscienco permesas, kaj kiel konvenas, kaj denove, kaj denove, kaj ankoraŭ unu fojon denove la samon!..."

Diru, mi petas, kiu elpensis... edzinon?

(klarigaj notoj p. 80 kol. 3)

Aligu al niaj festoj!

Kaj pagu, laŭplaĉe, Fr. 20, Fr. 25 aŭ Fr. 30

Ĉi sube ni presas la programon de la jubileaj festoj, kiuj okazos en Antverpeno, sabaton, la 12an, kaj dimanĉon, la 13an de februaro 1955a.

„In cauda venenum"... En la vosto la veneno... estas latina diraĵo, per kiu oni volas signifi, ke organizantoj, kutime, antaŭmetas unue la allogaĵojn kaj

Rea alvoko

En la ĉefartikolo de la antaŭa numero nia Prezidanto faris kelkajn alvokojn kaj li ricevis jam kelkajn respondojn.

Ni volas tamen ankoraŭfoje memori la diversajn demandojn:

1. la grupestraroj konigu al li, senprokraste, la nomojn de la jubileantoj, t. e. de tiuj, kiuj estas membroj de nia Ligo de almenaŭ 25 jaroj. Ili aldonu detalojn pri la dato de aliĝo kaj, por tiuj, kiuj esperantistiĝis antaŭ almenaŭ 40 jaroj, ili aldonu ĉiujn informojn pri la unuaj jaroj;

2. la izolaj membroj, kiuj apartenas al la kategorio de la veteranoj aŭ de la jubileantoj, ne hezitu agi same por si mem;

3. ĉiuj, kiuj posedas malnovan materialon, uzeblan por ekspozicio pri la historio de la unuaj jaroj de nia movado kaj pri nia Ligo ĝenerale dum la unuaj kvindek jaroj, havigu tiujn dokumentojn, kiel eble plej baldaŭ, al la Liga Prezidanto: 44, De Bruynlaan, Wilrijk.

Ĉiuj dokumentoj povas esti interesaj: fotografiaĵoj, malnovaj presaĵoj, regularoj aŭ membrolistoj de grupoj, manskribaĵoj de malaperintoj, ktp.

Estus ankaŭ interese, ke la Ligo posedu kompletan kolekton de „Belga Sonorilo", la revuo, kiu aperis antaŭ „Belga Esperantisto".

Nun, diversaj membroj posedas unu aŭ du kolektojn sed, laŭ nia scio, neniu posedas plenan. Ĉu oni ne klopodu kunigi la restaĵojn por fari unu tuton?

Antaŭdankon al ĉiuj, kiuj helpos!

Niaj Kotizoj

En antaŭa numero, ni presigis la kotizojn por U.E.A. Hodiaŭ ni aldonas la kombinitajn kotizojn por R.B.L.E.-U.E.A.:

Simpla membro:	Fr. 100
Familia membro:	Fr. 50
Membro kun Jarlibro:	Fr. 150
Membro-Abonanto:	Fr. 240
Membro-Subtenanto:	Fr. 350

Por junuloj kaj por Kadetoj, oni pagu resp. Fr. 50 kaj Fr. 75 malpli ol la cititaj kotizoj.

Bonfaranta membro aldonu Fr. 25 al sia kotizo.

Niaj Veteranoj

En nia antaŭa numero ni komencis la publikigon de kelkaj detaloj el la Esperanto-vivo de niaj Veteranoj.

La unua pri kiu ni atentigis estis nia vicprezidanto S-ro Joseph Soyeur, pri kiu ni ankoraŭ povas aldoni ke li, preskaŭ tuj post lia esperantistiĝo, gvidis jam kurson: en 1909 en Seraing; ankaŭ dum la unua mondmilito, en 1915-16 en Ougrée; ne kalkulante la pli postajn en 1936 kaj 1937 en Seraing; ĉi tiuj lastaj sub la aŭspicioj de la Societo Lieĝa por la Propagando de Esperanto.

Hodiaŭ ni volas voki antaŭ la okulojn de la leganto vizaĝon, kiun niaj lastvarbitoj ne plu tiel bone konas, sed kiun ĉiuj aliaj des pli regule vidis, dum jaroj, okaze de ĉiuj niaj naciaj manifestacioj:

S-inon Maria Elworthy Posenauer

kiu ĵus festis sian 80an naskiĝtagon kaj kiu esperantistiĝis en 1906, kiam ŝi sekvis, en la Mezgrada Lernejo de la Eikenstraat en Antverpeno, kurson gvidatan de la tiam tre konata profesoro Sino Broymans-De Schutter.

La saman jaron, Fino Maria Posenauer iĝis membrino de la nun malaperinta „Antverpena Grupo Esperantista", kiu tiam kunvenis en la „Taverne Royale", ĉe la angulo de la Verda Placo kaj de la Schoenmaekt; kaj poste de „La Verda Stelo". En ambaŭ ŝi iĝis komitatano.

En 1908, ŝi akiris la diplomon pri Profesora Kapableco, en unua grupo de kandidatoj, kiuj akiris sian diplomon, post ekzameno en „Hotelo Ravenstein" en Bruselo.

Ekde la komenco, ŝi estis tre konata ĉeestantino de la universalaj kaj de la

poste nur parolas pri la prezo kaj eventualaj malagrablaj flankoj.

Ni ne agos same! Ni komencos per la mona flanko de la partopreno al tiuj ĉi festoj kaj ni diru tuj, ke la kotizo estas laŭplaĉe Fr. 20, Fr. 25 aŭ Fr. 30.

Kvankam la festoj estos same ampleksaj, kiel tiuj de nacia Kongreso, — ĉar la lundan ekskurson en Kongreso ĉiu tamen pagas aparte —, la Organiza Komitato decidis fiksi la kotizon nur je la duono de Fr. 50, t. e. Fr. 25.

Kaj, por akiri bonan organizon per ĝustatempa antaŭpago, ĝi kromdecidis plimalaltigi tiun ĉi kotizon ĝis Fr. 20 por tiuj, kiuj pagos ĝin, ni diru: tuj, t. e. kies kotizo alvenos sur la P.C.K. No. 449386 de la kasisto, S-ro R. Balleux, Deurne-Antverpeno, ĝis la 7a de januaro 1955a.

Aliflanke, ĝi decidis plialtigi ĝin ĝis Fr. 30 por tiuj, kiuj pagos post la 31a de januaro 1955a.

Ĉiu do elektu mem la sumon, kiun li deziras pagi!

Sed, malgraŭ la fakto ke la enspezo estos malpli granda, ni tamen diras: Pagu antaŭ la fino de tiu ĉi jaro Fr. 20... Ni tion preferas al pago de Fr. 30 dum la tutlastaj tagoj!

Kaj vi ĉiuj, kiuj iam ion organizis kaj devis rilati kun oficialaj kaj komercaj instancoj, vi komprenos nin plej bone!

La kotizoj do, ekde nun, alflugu al la flughavena antaŭurbo de Antverpeno!

La Organiza Komitato.

* * *

Kaj jen do la programo de la semajnfinaj festoj:

Sabaton, la 12an de februaro

Ekde la 14a: en „Witte Leeuw": Akcepto de la alvenontaj partoprenantoj; Je la 14a: Delegacia flordemeto sur la tombon de la prezidinto de Rega Belga Ligo Esperantista Frans Schoofs;

Je la 15a: Flordemeto antaŭ la Monumento al la Militmortintoj, en la urba parko Kunveno, je la norda angulo de la Nacia Banko, sur la Av. de Francujo.

Je la 15.30a: en „Witte Leeuw": FESTKUNSIDO de la Esperanto-Grupo „La Verda Stelo", kiu honorigos siajn ĝejubileantojn.

(Tiu ĉi Grupo efektive prokrastis tiun ĉi solenon kaj sian jarfestenon, kiuj ordinare okazas dum la dua duono de januaro, ĝis tiu ĉi dato, por ne malbone influ la partoprenon al la jubileaj festoj).

Je la 16.30a: Vizito al la nova Internacia Marista Domego;

Poste: Okazo por vesperrango;

Je la 20a: en „Witte Leeuw": Kultura Horo, sekvata de BALO;

(Je la komenco de la posttagmezo, same kiel dum la Balo estos okazo por vizito de la Ekspozicio, kiu estos organizata, dank'al la kunhelpo de ĉiuj, kiuj posedas malnovajn dokumentojn pri nia Ligo kaj pri la pionira esperanto-vivo en Belgio... Dokumentojn, kiujn oni do sendu Tuj al la Liga Prezidanto).

Dimanĉon, la 13an de februaro

Post la Di-servo en indikota preĝejo, por la katolikaj partoprenantoj:

Je la 10a: en la Internacia Marista Domo: JUBILEA KUNSIDO DE R.B.L.E.:

Je la 11.30 aŭ 12a: en la Urbdomo: OFICIALA AKCEPTO, okaze de la Ora Jubileo;

Je la 13a: en la Internacia Marista Domo: FESTENO (Fr. 110 trinkmonoenkalkulita).

Je la 15.30a: Teatra aŭ Kabareta Posttagmezo;

De la 17.30a ĝis la 18a: Adiaŭo... aŭ agrabla kunrestado!

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.

Vicprezidanto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

Generala Sekretario-Kasisto: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo”, Falconrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo”

(Poŝtĉeknumero 726.54)

Granda ĉeestantaro la 29an de oktobro okaze de la Kabareta Vespero, kiu estis organizata tiun ĉi fojon, sen la kunhelpo de diversaj el niaj plej bonaj kunlaborintoj, malhelpataj pro soldata deĵoro ktp.; sed al kiu partoprenis kelkaj novaj elementoj, kiuj helpas, ankaŭ estonte, agrabligi la vesperojn. S-ro K. Ameryckx aŭdis belajn kantojn kaj S-roj C. Tytgat kaj F. Schellekens surprizigis ĉiujn, kiel bonegaj instrumentistoj, dum S-roj P. Peelmans kaj J. Verstraeten estis ankaŭ bonegaj monologistoj kaj amuzis la publikon. En skeĉoj, oni vidis kaj aplaudis F-inon Cl. Peeters, kiu ankaŭ piankompanis diversajn numerojn; S-inon Truyens kaj la jam suprecititajn sinjorojn. Komplimento ankaŭ iras al F-ino Vinck, kiu

naciaj kongresoj: En 1909 ŝi vojaĝis al Barcelono; en 1913 al Bern kaj ŝi aliĝis al la Pariza Kongreso, en 1914.

Ŝi estis L.K.K.-anino de la du Universalaj Kongresoj, kiuj okazis en Antverpeno: la VIIa en 1911 kaj la XXa en 1928.

Ŝi ankaŭ ĉeestis la unuajn belgajn kongresojn en Verviers, Bruĝo kaj Charleroi kaj, dum multaj jaroj, fakte ĉiujn postajn kongresojn.

En nia Ligo ŝi, longtempe, estis konstanta komitatano kaj, se ŝi neniam akceptis estraran funkcion, ŝi tamen oftege, en tagjurnaloj kaj revuoj, aperigis artikolojn pri nia lingvo, ĉu pramove, ĉu responde al kritikoj, kaj ŝia stilo estis tia, ke nur malofte artikoloj de ŝi ne estis akceptataj.

Ŝi efektive estas bonega stilistino kaj ŝi eldonis, en 1910, tradukojn de du rakontoj de Johanna Van Woude kaj „Rikke-Tikke-Tak” de Hendrik Conscience; pro kiu lasta, ŝi estis, en 1914, rekompencata de la Esperanta Akademio.

Nun S-ino Elworthy laŭŝajne retiriĝis el la movado, pro la fakto ke ŝi ne plu kapablas forlasi sian ĉambron... Sed neniu en nia lando verŝajne tiel akurate, enpense kaj enkore, sekvas nian movadon kiel ŝi. Kaj en ĉiu kongreso aŭ festkunsido ŝi kunestas per letereto aŭ karto kun nur kelkaj vortoj, sed kiuj sufiĉas por realvoki antaŭ ĉies spiriton la simpatian, amikan vizaĝon de nia ŝatata pionirino.

ĉiam helpas; tiun ĉi fojon, per presigo de la programoj.

La 5an de novembro, la parolata ĵurnalo estis anstataŭata de speciala Skota Vespero, organizata de grupeto de Verdstelanoj, kiuj dum la somero faris grandan vojaĝon por ĉeesti esperanto-ferion en Skotlando. S-ino De Backer tre detale priskribis la vojaĝon mem kaj tiuokaze montris belegajn lumbildojn, dum S-ro Wolfs, kiu anstataŭis F-inon Moriamé, malhelpatan, rakontis la labordividon de kelkaj tre ŝarĝitaj tagoj. S-ro Henri De Hondt fine konkludis, substrekte kaj apartaĵojn de tiu interese vojaĝo. Ni citu ke S-ro K. Ameryckx, kvankam li ne kunvojaĝis, tamen agrabligis la vesperon per kelkaj skotaj kantoj.

Je la fino de ambaŭ vesperoj, la prezidanto povis, per laŭdaj vortoj, substreki la efektivan sukceson akiritan de la prizorgintoj de la programo.

La 12an S-ino Lecat faris lertan kaj abunde dokumentitan paroladon pri „Morala Rearmigo”, tiu internacia movado, kiu akiris jam gravajn sukcesojn en multaj landoj kaj kiu alcelas la plibonigon de la homaro. Dum tuta horo, ŝi vekis la atenton de la ĉeestantaro kaj post longa aplaŭdado sekvis, se ne debato, tamen pridiskuto, al kiu partoprenis diversaj membroj, inter kiuj la prezidanto, kiu kore dankis.

La 19an, sepdek gemembroj ekdisid ĉe la tablo en la restoracio de la Internacia Marista Domo, por la tradicia mitulvespermanĝo, por kiu tamen, neniam antaŭe, estis tiel vere granda interesiĝo. S-ro Jaumotte, kiu atentigis pri tiu sukceso, dankis la direktoron S-ron Sielens... pro la duobla dukilogramo porcio antaŭmetita speciale al li... sed ankaŭ pro la bona aranĝo. Kaj ĉiuj, kontentegaj pri la vespero, ankoraŭ longtempe kunrestis.

Programo de la venontaj kunsidoj.

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw”, Frankrijk, 4, je la 20.30 (la etaĝo).

Decembro: (Memorige): la 3an: Parolata ĵurnalo; la 10an: Parolado de S-ro W. Deroisy, studento, pri lia vojaĝo al „Usono”; la 17an: Zamenhofa Vespero; la 24an kaj

ANONCOJ

Deziras korespondi kun belga samiden(in)o:
S-ro John J. Taylor, 17, Birkenhead Avenue, Kingston-on-Thames (Surrey Anglujo).
S-ro Stefan Kaszub, Wolow Sl., ul. Gen. Bema 14, m.l. (Polujo).

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe **BELGOMINE**

FRANKRIJKEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

la 31an ne okazos kunvenoj, ĉar ambaŭ estas antaŭvesperoj de Kristnasko kaj Novjaro.

Januaro: la 7an: Parolata ĵurnalo; la 14an: Jarkunsido; la 21an: Debatvespero; la 28an: Kabareta Vespero.

(Tiun ĉi jaron ne okazos aparta festeno de nia grupo, por ebligi al ĉiuj partopreni la festenon de la jubileaj festoj, la 13an de februaro).

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO.

RADIO kaj GRAMOFONO

Gratuloj

La 13an de novembro, edziniĝis la ĉarma membrino de „La Verda Stelo” Paula De Ketelaere, kun S-ro Carlos Tytgat, el Herseeuw, sed jam bona amiko de la Verdstelanoj.

Niaj plej koraj gratuloj iras al la junaj geedzoj, ambaŭ farmaciistoj, kaj ankaŭ kompreneble al nia fidela kunlaboranto, S-ro Morris De Ketelaere, vicprezidanto de „La Verda Stelo”, kaj al liaj gefiloj Henny, Rudolf kaj Johanna, ĉiuj gemembroj de nia Ligo.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C^o

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; **KATOKULO**, por signalvitroj.

BRUGGE

BRUGES

Hôtel du Cornet d'Or

2, Simon Stevinplaats, 2

Centra situo - Moderaĵoj

Moderna komforto

Sidejo de „Bruga Grupo Esperantista”

Tel. 314.59

Kondolencoj

Ni prezentas niajn kondolencojn al la gefiloj de S-ro Willem de Koning, malnova samideano, membro de „La Verda Stelo” ĝis la lasta mondmilito.

Willem de Koning estis veterano, kiu esperantiĝis antaŭ la unua milito kaj kiu akurate ĉeestis la kunsidojn de sia Grupo dum multaj jaroj. En 1928 li estis kunlaboranto de la L.K.K. por la XXa Universal Kongreso en Antverpeno. Li mortis nun 79jara.

BRUGO

Bruga Grupo Esperantista

(Poŝtĉeknumero: 4835.32)

La 26an de oktobro, okazis post la 13a kaj 14a lecionoj de la elementa kurso, muzika vespero per disaŭdigo de kelkaj belaj diskoj. Du tagojn poste, ne plu estis leciono, sed agrabla vespermanĝo, kiu kunigis dudek kvin gegrupanojn. La menuo entenis nur du pladojn por elekto: mituloj aŭ malvarma viando, ambaŭ kun fritoj, sed ĉiuj ĉeestantoj entuziasme honorigis almenaŭ unu el ambaŭ. La prezidanto, S-ro Poupeye, direktis bonvenigan vorton al la satigitaj manĝintoj kaj invitis S-ran Advokaton DE PAUW eldiri la cirkonstancan paroladon, kion tiu membro faris plej humore. Sed baldaŭ jukis la kruroj kaj sola rimedo estis agrabla dancado ĝis noktomezo.

La 2an de novembro (okaze de la Tagoj de la Mortintoj) ne okazis la ĉiusemajna kunveno. Dimanĉon, 7an, delegacio de la grupo kun la flago partoprenis en la funebra sekvantaro al la Milita Tombejo. Mardon 9an, post la kutimaj lecionoj okazis komunikaj kaj portretludado. Jaudon, 11-an de novembro bela filmvespero estis organizata por la grupanoj kun gefamilianoj kaj geamikoj. Rilate al la kvalito de la filmoj, oni povas eble bedaŭri ke ne sufiĉaj membroj aŭ invititoj ĉeestis. Monkolekto, favore de la Sta-Nikolao-festo de la Orfoj, produkt's 287 Fr. Fine la 16an de novembro, la lasta parto de la vespero estis dediĉata al kuna solvado de la krucvortenigmo en B.E.

Programo de la Sekvantaj kunvenoj:

Ordinara kunveno: ĉiuarde je la 20a, en la sidejo „Gouden Hoorn” - Cornet d'Or” - Simon Stevinplaats, 2;

Decembro - (memorige) 7an: Muzika vespero; 14an: Zamenhofa vespero; 21an: Ekzameno pri elementa grado; 28an: Surpriza finjara vespero: ĉiu alportu nekonatan premion.

Januaro 1955: 4an: Muzika vespero; 11an: Parolata gazeto: (ĉiu preparu antaŭlegotan tekston pri iu ajn subjekto) 18an: Legado de B.E. — 25an: Generala kunsido: Raportoj, Elekto de la komitato, Difino estonta agado, k.t.p.

Kondolencoj

Al S-ro Advokato kaj S-ino R. DE PAUW-SUY, gemembroj de la Bruga Grupo, pro la morto de ilia patro kaj bopatro, S-ro Pierre DE PAUW (Blankenberge 28/11/54).

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo

(Poŝtĉeknumero: 12.30.48)

La 20-an de septembro kaj la 18-an de

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

oktobro S-ro VanderSTEMPEL donis siajn lecionojn por la perfektiga kurso instrue kaj meritplene kiel ĉiam.

La 13-an de septembro estis la vico de S-ino STERN, kiu tre bone prelegis pri „Operetoj”. Ŝi ankaŭ aŭdis al ni diskojn i.a. el „La Belle Helène”, „La Fille de Madame Angot”, „Véronique”, „L'Amour masqué”, „Tri Valsoj”, „Showboat” kaj fine la fam-

LISTO LE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ**Antverpeno**

Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.

ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86
J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arhitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
Henny de Ketelaere, Oostenstraat, 25, Antverpeno. Privataj lecionoj
Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14.
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Dambruggestraat, 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67.
L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiusp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.
Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspulrado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38
Verdijk, Oude Doncklaan 106, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj.
M. Blajwas, Simonstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj.

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj.
„De Boerinekens” (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo.
A. Roels, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj.
Van Kerckhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj, gardenilaro
Butiko Angora, (novaj galerioj), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj sportŝuoj

Bruselo

Farmaciisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmaciisto N. Nelis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE”, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liéens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrat”, 19, avenue de Saïo 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX” 16, rue Esnet Laude 15.28.29

konatan „Veuve joyeuse“ de Léhar. S-ino Stern rikoltis multe da aplaŭdo por la agrabla vespero, kiun ŝi preparis al ni.

La 27-an de septembro, S-ro SWINNE parolis pri „Liber-Ekonomio“. La preleginto tiun fojon pritraktis la monan politikon en Anglujo dum la lasta jarcento. Post la prelego estiĝis tre interesa diskuto.

La 4-a de oktobro estis iomete festa vespero. Ĝi estis dediĉita al la disdono de la diplomoj. Unue al du fervoraj samideanoj, S-ro NELIS kaj S-ro Schoemacker, kiuj brile sukcesis en la ekzameno por la elementa kurso. Kore gratulante la laŭreatojn, la prezidanto enmanigis al ili la diplomojn. En la konkurso de la parolata ĵurnalo S-ro VanderSTEMPEL akiris la unuan premion kaj S-ino ELLY STAES la duan. S-ino CASTEL akiris la premion por la plej regula ĉeesto de niaj kunvenoj. Kun kelkaj afablaj gratulvortoj la prezidanto disdonis al tiuj tri iliajn diplomojn kaj al ĉiu el ili ĉekon, por kiu ili povas aĉeti esperantan libron. S-ro VanderStempel kaj S-ino Staes poste refoje laŭlegis sian plej sukcesantan artikolon, nome S-ro VanderStempel pri „Josefine Baker, artistino, kiu kontraŭbatalis la rasismon“ kaj S-ino Staes pri „Marolo“. La tre agrabla vespero finiĝis per bela pianludado de nia sindonema S-ro VanderStempel.

La 11-an ni havis la plezuron aŭskulti S-inon DAEMS, kiu parolis pri „Terpomoj“, la plej grava nutraro por diversaj popoloj. Ŝi finis la prelegon per gustumigo de „beignets“ kaj „chips“. Por tiu materia parto de la prelego la laŭdo apartenis al S-ino CASTEL, kiu bonvolis ŝanĝi la tiel krudajn terpomojn en tiel bongustan manĝaĵon. Ambaŭ sinjorinoj rikoltis aplaŭdon kaj dankon.

La 24-an de oktobro okazis nia jara festeno, ĉi tiuj fojon organizita honore al S-ro VanderSTEMPEL kaj pri kiu ni jam detale raportis.

La 25-an de oktobro, ni aŭskultis la unuan prelegon de S-ro NELIS, kiu rakontis, kiel li fariĝis Esperantisto. Tiu prelego apartenas al la plej bonaj, kiujn ni aŭdis en la lastaj monatoj.

La 1-an de novembro ne okazis kunveno.

La 8-an de novembro, la tagordo notis: Parolata ĵurnalo. Multnombre la gesamideanoj partoprenis la unuan vetkuradon de la parolata ĵurnalo 1954—1955, per unuarangaj kontribuoj. La venko estis por S-ro Claude PIRON el Namur, kiu per sia difino de la parolata ĵurnalo nome:

Se inspiro havas mankojn,
Oni donas du frankojn,
Tiel venas la dilemo,
Se vin trafas silentemo;
Ĉu la son' de mia voĉo,
Ĉu la mon' de mia poŝo!

akiris la plej grandan poentnombron. Dua fariĝis S-ino CANTY, kiu ĉeestis kie gastis

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

(Solvaj estas sendotaj al S-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 10a de januaro 1955.)

SOLVOJ.

179. kapkuseno, silkraŭpo, trinkmono, libervole, kroĉtriki, ventolilo, speguligi, precizigi, postsigno, interveni, reakciulo, obstinulo, piedfrapi, vangfrapo, pavimisto, privatulo, kritikema, registaro, klientaro, profetajo, velveturi, sukoplana, neokupita, almozpeti, vaporŝipo, flamiĝema, elturnigo, friponaĵo, orgenisto, gvidlibro. Pli bone estas enviigi ol kompatigi.

180. *Hor.*: kremo, nav, io, rok, bru, eman, ekzot, bo, ami, usonan, jaluza,

no nian kunvenon, kaj tria S-ro SCHOE-MACKER.

Programo de la sekvontaj kunsidoj:

Decembro: (Memorige): Dimanĉon, la 5-an: Sankta Nikolaa Festo; lundon, la 6-an: Parolata ĵurnalo; la 13-an: Zamenhofa Vespero; la 20-an: Perfektiga Kurso; la 27-an: Kristnaska festo.

Januaro: La 3-an: Parolata ĵurnalo; la 10-an: Skotaj klanoj, parolado de D-ro Maes; la 17-an: Perfektiga Kurso, de s-ro D. VanderStempel; la 24-an: Humoristoj kaj humorajoj, parolado de S-ro H. Castel; la 31-an: Generala kunveno.

Funebro

Ni funebras pro la morto, je 84jara aĝo, — kaj sekve al aŭtomobil-akcidento, — de fidela membro de Brusela Grupo, Ligo kaj U.E.A., S-ro Paul Nyssens, kiu naskiĝis en Antverpeno kaj akiris la diplomon de civila inĝeniero.

Dum vojaĝo en Usono, li interesiĝis pri mensa kulturo kaj reveninte en Belgion, li starigis Instituton por homa kulturo, kiu portas lian nomon. Li eldonis multajn librojn pri tiu temo kaj unu el ili estas esperantigita sub la titolo „Bonhumoro“.

Ni vidis lin por la unua fojo dum la Kongreso en De Panne en 1926 kaj de tiam li dum multaj jaroj tute regule ĉeestis niajn jarfestojn.

VERVIERS

Esperantista Grupo Verviers

Kunvenoj ĉiulunde je la 20a en la kutima cjo:

Januaro: la 3-an: Novjara Festo; la 10-an: raportoj pri la agado dum la lasta jaro; reelektado de parto de la komitato; la 17-an: prelego de Prof. Vanbreuse pri „Abelbredado“ kun filmoj kaj lumbildoj (versajne en la Reĝa Ateneo, kies prefeto pruntedonas la salonojn kaj la aparaton; la 24-an: Gazetara vespero; la 31-an: Krom komuna tradukajo, bonhumoraj rakontoj de S-ro Kairis.

ileks, lado, plaĝo, pi, kal, flor, era, trofe, ek, nerekt, ondad, urin, ono, fuŝita.

Vert.: kreaĵ, patrol, rok, agl, ekzil, akordo, urĝ, an, obtuz, ofendo, sal, nubo, apokrif, onidir, ve, alo, akuŝ, mane, ke, tri, iam, klare, it, oniks, lakona.

181. CIFERENIGMO.

Helpe de la subaj vortoj rekonstruu 114-literan strofon de versaĵo, aperinta antaŭ kelka tempo en ĉi tiu gazeto.

Klarigo de la serĉotaj vortoj:

- 1) 71.9.25.75.102.4.31.87.99.16.34.26.: ĝi moviĝas laŭ la vento.
- 2) 19.28.61.66.85.2.107.87.96.80.26.: iu servistino.
- 3) 1.42.53.70.91.22.73.17.27.26.: muzikilo.
- 4) 62.79.105.3.43.54.23.51.89.26.: muzikilo.
- 5) 20.32.83.110.90.30.57.82.26.: ĝi kreskas sur altaj montoj.
- 6) 41.56.18.68.81.90.93.29.103.: hejmigita.
- 7) 52.77.112.46.78.40.75.26.: konfite en vinagro, ĝi servas kiel spicaĵo.
- 8) 100.50.88.5.47.59.49.26.: ĝi produktas fajrerojn, eksplodigantajn la gasmiksajon en motoro.
- 9) 97.108.38.60.8.65.94.26.: inflamo de la fingro
- 10) 70.11.58.1.111.39.106.: definitive forigi.
- 11) 6.48.25.21.55.110.26.: hejma besto.
- 12) 7.109.101.36.69.75.26.: aro da organoj rilatantaj al sama fiziologia funkcio.
- 13) 49.86.71.15.113.13.26.: floro.
- 14) 10.74.31.104.33.64.26.: mastro.
- 15) 95.108.64.72.22.76.: trempi en vinagro kun spicoj.
- 16) 63.35.84.98.12.26.: frukto el varmaj landoj.
- 17) 80.14.44.67.45.26.: nimfo de riveroj.
- 18) 92.37.66.24.114.26.: malgranda mamulo ofte uzata por vivisekcio.

(Komenco: p. 76, kol. 3)

14) „Bar-micvo“: atingo de la 13-jara aĝo, kiam hebreo fariĝas religie memstara.

15) Metala signo, kiun la gimnazianoj portas sur la ĉapo.

16) Frato de la Biblia Jakobo.

17) Homo, pri kiu la Biblio rakontas, ke lin englutis la tero.

18) La aŭtoro rakontas ĉi tie pri la striko, kiun dum la rusa-japana milito faris la gimnazianoj en preskaŭ ĉiuj gimnazioj de Polujo. Tiu ĉi striko malfeliĝis tre grandan nombron da infanoj.

Verantw. uitgever: Reĝa Belga Ligo Esperantista, De Bruynlaan 44, Wilrijk. Drukkerij Krol, Hoofdstraat 29, Uithuizen (Ned.)